

Gottfried Keller,  
Friede der Kreatur

Spinnen waren mir auch zuwider  
All meine jungen Jahre,  
Ließen sich von der Decke nieder  
In die Scheitelhaare,  
Saßen verdächtig in den Ecken  
Oder rannten, mich zu schrecken,  
Über Tischgefild und Hände,  
Und das Töten nahm kein Ende.

Erst als schon die Haare grauten,  
Begann ich sie zu schonen,  
Mit den ruhiger Angeschauten  
Brüderlich zu wohnen;  
Jetzt mit ihren kleinen Sorgen  
Halten sie sich still geborgen,  
Läßt sich einmal eine sehen,  
Lassen wir uns weislich gehen.

Hätt' ich nun ein Kind, ein kleines,  
In väterlichen Ehren,  
Recht ein liebliches, ein feines,  
Würd' ich's mutig lehren,  
Spinnen mit den Händchen fassen  
Und sie freundlich zu entlassen;  
Früher lernt' es, Friede halten,  
Als es mir gelang, dem Alten!

...

Gottfried Keller,  
Pacon inter kreaĵoj  
*tradukita de Richard Schulz*

Araneoj min naŭzadis,  
Dum mi junulo estis,  
De l' plafon' malleviĝadis,  
Sur la verto-haroj pestis,  
Sidis aĉe enangule;  
Aŭ kuregis tarantule,  
Super manoj kaj vitrino.,  
De l' mortig'ne estis fino.

Kiam la harar' griziĝis,  
Tiam nur mi ilin lasis.  
Pli trankvile mi fariĝis.  
Ilin ne plu embarasis.  
Kaj fratece ni nun vivas.  
Mi ne plu ekofensivas.  
Mi endome, ili rete,  
Ĉiu agas nun diskrete.

Se mi havus infaneton,  
Estus patro honorata,  
Montrus mi la fajnan reton,  
Al la zorge edukata,  
Kaj instruus ĝin ekipreni  
Araneojn per la mano,  
Ree ilin ekmalteni.  
Amus pacon la infano!

...

Gottfried Keller,  
Pacon al la kreaĵo  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Araneojn malŝatadis  
Mi dum juncaj jaroj,  
Ili malsupren sin lasadis,  
Kuris sur la kap-haroj,  
Sidis kaše en anguloj;  
Min timigis la aŭloj,  
Sur la tablo kuregadis,  
La mortigo ne cēsadis.

Kiam la harar' griziĝis,  
Mi ilin ne plu casis,  
Tiam fine mi saĝiĝis,  
Ilin vivi lasis.  
Nun mi ilin rare vidas,  
Kaše ili ie sidas;  
Sed se iu sin vidigas,  
Mi min saĝe elvojigas.

Se mi havus infaneton,  
Mi gardus ĝin honore,  
Gvidus ame la hometon,  
Dirus al ĝi kore:  
,Lasu vivi araneojn,  
Ili same sentas veojn.'  
Frue iĝus ĝi paculo,  
Ne nur kiel maljunulo!

...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, \*1819-07-09 – †1890-07-16).

Arg-318-642 (2005-08-02 15:04:45)

Traduko de la Germana poemo “Friede der Kreatur” de GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, \*1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1982-10-15.

Arg-318-644 (2013-02-26 15:15:16)

Pri Rikardo Ŝulco kaj lia Analiza Skolo vidu ankaŭ: <http://www.ipernity.com/doc/37943/8965446> kaj [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Traduko de la Germana poemo “Friede der Kreatur” de GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, \*1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-10-10.

MR-003-2 / Arg-318-643 (2005-08-02 15:49:32)